**50 jaroj de ekumenismo, kaj poste**

Antaŭ 50 jaroj ne nur okazis la unua ekumena esperantista kongreso, sed ankaŭ komencis sian vivon la Supera Instituto pri Ekumenaj Studoj (ISEO) en Parizo.
Ĝi funkcias ene de la teologia fakultato de la Katolika Instituto. En ĝi kunlaboras la Protestanta Teologia Instituto kaj la ortodoksa teologia Instituto Sankta Serĝo. Inter la diplomoj kiujn ĝi preparigas estas la Supera Diplomo pri Ekumenaj Studoj, kun instruistoj el la tri fakultatoj.
Ĉiujare dum printempo ĝi organizas kolokvon tritagan kun prelegoj de diversaj fakuloj.
En 2018, la temo estis : "Novaj teritorioj de ekumenismo : movoj dum 50 jaroj kaj alvokoj por la estonteco".

En la unua tago, la franca Granda Rabeno Korsia lasis al ni ĉi tiun moton : pli ĝuste diru "Iru al paco" ol "Iru en paco". La renkonto estas ĉiam movo, kaj ĉiu devas eliri el sia propra Egiptio.
En la mateno La franca pastorino Jane Stranz komparis la historion de ekumenismo al la vojo de rivero, kiu nun estas en stadio de delto, kun multaj fluejoj kaj insuloj, eblecoj kaj problemoj. Mi ne ĉiujn prelegintojn prezentos. Mi pensas ke tiuj ideoj devas pensigi nin.

Ni aŭdis pri kio povas esti "diferencigita konsento", kaj kiamaniere ni povas vivi la komunecon (koinonia) ene de la sama konfesia familio kaj inter la kristanoj ĝenerale.
Ni ĉiuj komune referencas al la Biblio, sed ĉu tiu referenco estas helpa aŭ bremsa ? Ekzemple, ni ne havas la saman kanonon, la saman liston de bibliaj libroj. Aŭ ni ne konsentas pri la maniero ekzegezi, kvankam pli kaj pli la fakuloj alproksimiĝas.
Praktike, la etikaj vidpunktoj varias, eĉ la limoj troviĝas ene de la konfesioj. Daŭre dialogi necesas.
Eĉ, kio devus kunigi nin kristanojn fakte dividas daŭre nin, nome la sakramentoj, kaj lige kun ili la kompreno pri la naturo de la Eklezio. Tiurilate la akcepto aŭ neakcepto de virina ordinita servado same daŭre dividas la ekleziojn.

Du prelegantoj koncizigis nin pri la fakto ke antaŭ la mondo, ni, kristanoj, estas vidataj kiel samaj. La UN-direktoro pri aidoso apelaciis al la helpo kaj subteno de "la Eklezio", ne de tiu aŭ alia eklezio, sed de "la Eklezio" kvazaŭ por la mondo bezonanta ni estas jam unu kiun la aliaj bezonas. Ortodoksa pastro komprenigis al ni, ke kiam teroristo ekstremista islamista murdas kristanojn (Ili ankaŭ murdas islamanojn kaj aliajn) ili ne celas tiun aŭ alian konfesion, sed kristanismon tiakaze. Antaŭ la cetera mondo, la kristanoj troviĝas nun "en la sama sako". Por la plejmulto niaj diskutoj kaj disputoj havas nenian signifon. Ni estas atakataj kiel kristanoj. Ni estas atendataj kiel kristanoj.

Fakte, en nia nuntempo, aparteneco estas pli komplika, kompleksa. Ne sufiĉas diri : mi estas tia. Oni tuj aldonas : kaj ankaŭ tia sed ne tia. Ene de la propra konfesio troviĝas distingoj, tra la konfesioj estas samecoj. Bonhoeffer en sia libro pri komuneco aludas al muziko, kiam ĉirkaŭ komuna peco, "*cantus firmus*" troviĝas variaĵoj. Kio estas nia "*cantus firmus*" ? Cetere, ĉu ĉiam oni devas veni al konsento, aŭ ĉu foje pli valoras bona malakordo ?

La franca antila poeto Edouard Glissant, citita de preleginto, parolis pri arkipelaga penso. Ni oftege pensas per kontinenta penso, eĉ tektonike, kiam ni devus pensi ĝuste arkipelage, pluraj malsamaj insuloj en rilato unu kun la aliaj kaj konsitigantaj arkipelagan tuton.

Ekumenismo estis, estas kaj estos plurnivela : de la bazaj kristanoj, de la teologoj, de la ekleziaj instancoj, kaj sub la okuloj de la cetera mondo.

Por reveni al niaj ekumenaj kongresoj, konklude, mi rememoras prelegon de Lajos Kóbor en Dalfsen : Kion ni povas fari kune  sen diskuti (disputi) pri teologio ?

Ĝis baldaŭ en Poděbrady.